


SUPERANCIJA STELO



Bulteno de la Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"

Jarabono: 30 F

al Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon

CCP 956-28 P Montpellier - N° 124 - la kvaronjaro 1993 -

CU VI ...?

Cu vi vere aŭdacos "pantoflumi" hejme, kiam...

... Esperantistoj el najbaraj departementoj vizitos vian regionon
(Limoux - 15/16 V),

... Profesoro Pierre Janton prelegos samdate en la franca kaj E°,

... novaj Esperantistoj de Ariège atendas vian kuraĝigon,

... trinkeblos "Blanquette" en la keloj mem,

kiam...

... 4taga staĝo okazos apude en Agde en trankvila loko

... vi havos la eblecon perfektigi en la lingvo (Akademiano J. Thierry,
aŭtoro de la metodo "E° sen peno" ĉe Assimil, gvidos la triagradan
kurson),

... internaciaj semajnoj disvolviĝos en Habère-Poche (en Aŭgusto) kaj en
Sète (en Septembro),

... kiam...

... enbusiĝinte aŭ entrajniĝinte vespere, vi estus matene inter pluraj
miloj da Esperantistoj el plej diversaj landoj? ktp, ktp???

CERTE NE!

Gis baldaŭa revido !

Traduction libre:

Oserez-vous trainer chez vous en pantoufles alors que...

... des Espérantistes des départements voisins seront dans votre région
(à Limoux, les 15 et 16 Mai),

... le Professeur Pierre Janton y parlera en français et en espéranto,

... de nouveaux espérantistes d'Ariège attendent votre soutien,

... il sera possible de boire la "Blanquette" sur les lieux de production,

... alors que...

... un stage de 4 jours aura lieu tout près à Agde, au calme,

... vous aurez la possibilité de vous perfectionner en E° (Jean Thierry,
membre de l'"Akademio", auteur de "L'Espéranto sans peine", guidera le cours
du 3° degré),

... des semaines internationales se dérouleront dans les Alpes (Habère-Poche en
en Août) et au bord de la Méditerranée (Sète en Septembre)

... alors que...

... ayant pris dans la soirée le train ou le bus (NDLR: Iberbus/Eurolines),
vous vous retrouveriez le lendemain matin parmi des milliers d'

Espérantistes des pays les plus divers (Congrès de Valenciana)

...etc, etc...

CERTAINEMENT PAS!

Alors, à bientôt!

ATENTU !

Se vi intencas veni al Limoux, aliĝu rapide!

-ĉar la kotizo baldaŭ plialtiĝos (post la 16 IV),
kaj ankaŭ ne plu eblos rezervi ĉambrojn kaj saba-
-tajn vespermanĝojn!

Informu Jorgos telefone (61 60 86 83) kaj tuj poste
sendu vian aliĝilon!

OFICIALE: Estas konfirmite, ke nia federacio organizos la **NACIAN KONGRESON**
en 94. Pri la loko kaj datoj (Agde, Sète, Ĉielirado aŭ Pentekosto), ni disku-
-tos en Limoux. Esperanto estas ĉies afero. La estonta Kongresa Komitato
bezonas vian helpon. Anticipan dankon!

LIMOUX

FEDERACIA KONGRESO

en Limoux (Aude)
la 15an
+ 16an de Majo 1993
Salle Louis Coste



La programo koncize:

Sabaton, la 15an de Majo, ekde la 9a horo: akceptado/13.30: Ekzamenoj (FEI)

→ 15.30: Franc/okcitan-lingva publika debato: "Occitanie, Catalogne, Régions linguistiques d'Europe". P. Janton parolos pri : danger d'une langue puissante comme l'anglais, comment l'E° peut protéger les langues d'Europe.

19.00: vespermanĝo 20.15: E°-spektakleto

21.30: Folk-balo kun Aigarela (danco-gvidado en E°). Dancemaj nekongresanoj pagos 30F.

Dimanĉon, la 16an: Federacia jarkunveno. Diskuto pri la Nacia kongreso 94.

La kunveno komenciĝos je la 9a horo ←

Dum la mateno intervenos gejunuloj. Je la 12a h, P. Janton respondos en E° viajn demandojn.

→ 12.00: Regiontipa festmanĝo en "Maison de la Blaquette"

14.00: (escepte por ni senpaga) vizito de la keloj "Sieur d'Arques". Poste piedmigrado aŭ vizitoj laŭ intereso.

Pri la aliĝilo:

* kongreskotizo: novaj tarifoj: ĝis la I6 IV (federaciano) 50F, poste 70F (nefederaciano: 60F/80F), gejunuloj (13-26j.) = 40/60F familiano de plenkotizulo: 40/60F infanoj: 20/40F Nefrancianoj: senpage

** "Blaquette" kun E°-etikedo: 6 boteloj = 210F

*** se ni estos 50, la vespermanĝo kun tranoktado kostos malpli ol 100F !

Adresoj: telefonaj 61 60 86 83 aŭ 61 01 01 65 telekopia: 61 67 20 25

poŝta: E° kongreso Office de Tourisme BP 5 11303 LIMOUX

Federacia Kongreso: ALIĜILO

Resendota al "Esperanto-kongreso B.P.5 Office de tourisme F-11303 LIMOUX

NOMO (J)
ADRESO poŝta:

.....
telefon-numero:
□ □ □ □ eventuale: naskiĝdato:
profesio:
ŝatokupoj:

Mi pagas per bankĉeko aŭ poŝtĉeko (pĉk Montpellier 956-28 P) al "Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon" por:

-kongresaliĝo (neniel repagota) FF *
-Antaŭmendo de "Blaquette" kun E°-etikedo FF **
-Antaŭmendo de lokaj poŝtkartoj kun E°-teksto ___ F (1Op.=20F)

-sabata vespermanĝo (vegetara: jes/ne)

-sabata tranoktado en unupersona ĉambro) *elktu!*

" en dormejo
(vespermanĝo+tranoktado = malpli ol 150F = antaŭmendo de 50 F

-Dimanĉa festomango en "La maison de la Blaquette" = 95F F

-Donaco por helpi al junulara programo F

-Donaco por helpi la ĝeneralan organizadon... F

Sume ___ FF
per kunsendata ĉeko.

Mi kandidatas por ekzameno... agrada de , sendante mian aliĝilon antaŭ la 1a de Marto '93.

Mi kandidatiĝas al la komitato de Langvedoka-Rusiljona Federacio de Meznorda-pirenea federacio.


Subskribo _____ Dato: _____

Rimarkoj aŭ demandoj:

Pliaj antaŭmendoj:

Piedmigrado: per aŭta ekskurso:

Vegetara dimanĉa festmanĝo: jes/ne



La Turism-oficejo (malfermata sabate ĝis la 12a h.
 Tel 68 31 11 82 volonte informos vin.
 La tendumejo (Av.Allende) malfermiĝos la 15an V.
 Tel.N^o de hoteloj (parenteze prezoj de ĉambroj
 por 2 personoj):Motel Occitan * 68 31 30 95 (150/195)
 Hotel le Mauzac** 68311277 (125/240),des Arcades **
 68310257 (185/220), Moderne et Pigeon*** 68310025(270/410)
 Aliaj hoteloj sen indikoj:Mauroux 68310980
 Mairie 68312278. Informoj minitele:36 14 Aude (ne funkcias nun)

*La ŝaŭmvinino de Limoux estas pli malnova ol Campano.
 Ĝi estas inventita en la 14a jarcento.
 Samdistance de Perpignan kaj de Toulouse (100 km),
 Limoux troviĝas je pluraj vojkruciĝoj, en la lando
 de la Kataroj. Multaj malnovaj konstruaĵoj atestas
 pri riĉa pasinteco. Tradicioj estas zorge konservitaj;
 la fama karnavalo kun la "Fecos", ĉiudimanĉe de la
 mezo de Januaro ĝis la fino de Marto, estas malparado;
 Ĝi estas pura folkloro (vidu ĉi supra)
 Kaj 24km norde de Limoux la citadelo de Carcassonne
 estas alia allogaĵo.*

*La "guide du routard" L-R. varme priskribas (p.96)
 Limoux kaj rekomendas la restoracion, kie ni tagmanĝos
 dimanĉe. Ĉu vi ankoraŭ hezitas veni al Limoux?*



ESPERANTO - STAĜO en AGDE

HERAULT - FRANCE

LOKO

feridomo BATIPAUME, kamparmeze je 2km de Agde kaj de la maro.

DATOJ

de la 19a posttagmeze ĝis la 23a de Majo 1993 ptm.

PREZO

170FF /tage en 2lita cambro (680 FF por la tuta restado)

880FF en unulita cambro.

Littukoj entenataj; kunportu nur tualettukojn.

KOTIZO

120FF ĝis la 30a de Aprilo, 180FF poste.

Senpaga por la junuloj malpli ol 25 jaroj

:-:-:-:-:-

SCIU:

Por la personoj, kiuj alvenos vagonare, aŭtomobilo atendos vin ĉe la stacidomo.

ANTAUPAGO:

290FF (170+120) antaŭ la 30a de Aprilo. 350FF poste,

sendu ĉekon aŭ poŝtmandaton je la nomo de :

Fédération Départementale Esperanto de l'Hérault

LIEU

Maison de vacances BATIPAUME, en pleine campagne à 2km d'Agde et de la mer.

DATES

du 19 Mai après-midi au 23 Mai 1993 après-midi.

PRIX

170FF /jour en chambre à 2 lits (680 FF pour tout le séjour)

880FF en chambre individuelle.

Draps compris; apporter linge de toilette.

COTISATION

120FF jusqu'au 30 Avril, 180FF ensuite.

Gratuit pour les moins de 25ans.

:-:-:-:-:-

SACHEZ:

pour les personnes qui arriveront par le train, une voiture les attendra en gare .

ACOMpte:

290FF (170+120) avant le 30 Avril, 350F ensuite, à adresser par chèque ou mandat au nom de:

Fédération Départementale Esperanto de l'Hérault

C.B.E. 9 Rue G. Picot 34500 BEZIERS

TELEFONNUMEROJ

Tel. 67-311-318 / 67-311-346 / 67-380-352

aldonu afrankitan koverton por pliaj informoj

ajoutez une enveloppe affranchie pour plus amples informations

AKADEMIANO
ESTOS INTER NI !

Jean THIERRY

INSTRUOS
LA TRIA GRADAN
KURSON.

BONA
NOVAĜO ! →

Dua novaĵo: Posttagmeze eblos inicado al akvarelo (laŭdezire) inter la 14^a & 16^a h.

Provizora programo:

Programme provisoire:

Matene de la 9a ĝis 11a k.1/2: Kursoj.

Le matin de 9h. à 11h30: cours.

Posttagmeze libera tempo ĝis la

16a k.1/2. Promenado k.t.p..

Après midi libre jusqu'à 16h30.

Promenade E.T.C..

Poste kursoj ĝis la 19a.

Ensuite cours jusqu'à 19h.

Post la vespermanĝo distra vespero.

Après le repas du soir soirée récréative.

Estus interese, se vi partoprenus en ĝi

laŭ viaj kapabloj.


Il serait intéressant que vous y participiez selon vos possibilités.



**- Je cours faire de
l'esperanto au soleil d' Agde!**



*Agde kaj
la maro
estas je 2 km*



34 BEZIERS

STAGO: Aliĝis 30 personoj, se oni enkalkulas la instruistaron kaj la Bezieranojn. Rimarkinde estas, ke preskaŭ ĉiuj aliĝintoj **NE APARTENAS AL LA FEDERACIO**. Kial? Ĉu Agde ne estas sufiĉe alloga por niaj regionanoj? Ĉu la gvidado de la triagrada kurso fare de S-ro Thierry, Akademiano, timigas niajn najbarojn? Aliĝu kiel eble plej rapide, ĉar fine de Aprilo ni devos informi la estraron de Batipaume pri la nombro de staĝanoj.

Kampanjo por la Liceoj: La liceestro de J. Moulin invitis S. Authier kaj J-P. Peray prezenti esperanton. Malfeliĉe la tago estis vendredo (9 IV) kaj la horo la lasta de la semajno. Ĉeestis unu profesorino pri filozofio. Certe oni devos provi denove je pli oportuna momento.

NDLR: Eble ni elektos Agde por la Nacia Kongreso, ĝuste pro tio, ke Batipaume perfekte taŭgas por la loĝado, por la salonoj (aldone al la "Palaco de la Fes-toj" en Agde), ankaŭ pro la atingebleco, la turismeblecoj apudaj, ktp.

Venontaj montaj kunvenoj de la grupo:
 en Majo, vendredon la 7an kaj en Junio, sabaton la 5an
 Ĉiam je la 14h.30 en ĉambro de "Maison de la vie associative".
 Fine de Junio, kiel kutime, Dimanĉon, la 27an de Junio, ni renkontiĝos en Mond-hejmo, en Caùduro (je 12 Km de St Chinian). Rendevuo je la IIa horo.
 Komuna pikniko.
 Ĉiuj amikoj, esperantistoj aŭ ne, Bezieranoj aŭ ne, estos **BONVENAJ** kaj estas kore invititaj. Por pli precizaj informoj: CBE 67 31 13 18.

MONTPELLIER

Ĉiam mankas kasist(in)o al nia grupo, neniuj proponis!
 Post la sendo de 40 pakajetoj al liceoj, venis unu dankletero (Mas de Tesse). La grupo estis invitita partopreni "feston de Eùropo", kiel en Nîmes lastjare. Ni ne estos pretaj ĉijare, verŝajne en 94.
 Datoj de la venontaj kunvenoj: la 12a de Majo kaj la 2a de Junio.
 Aliĝoj alvenis por la 2 internaciaj semajnoj en Habère-Poche kaj Sète.



HABERE-POCHE
21ĝis28VIII



Kontaktadreso por Aliĝoj, informoj, klarigoj:
ESPERANTO 5, Rue du Docteur Roux
F 34000 Montpellier

Bonvolu aldoni koverton kun via adreso.

Limdato de antaŭmendo: Habère-Poche 1 VII/Sète: 15 VII

30 ALES

Sro Bolla prelegis la 19an de Januaro pri Esperanto en la urba kulturdomo antaŭ 40 emeritulinoj, ĉiuj aninoj de la asocio AVF Alès-Accueil.

Konstante li daŭrigas sian elementan kurson por geknaboj ĉiusemajne en Le Mas Sagnier. Kun la helpo de Sro Vigne, li deĵoras por vizitoj kaj petoj pri E° en la Kulturdomo ĉiun semajnon. Al juna komencantino, S-ino Laillé, Sro Vigne freneze proponis tuj havi eksterlandan korespondamikinon; ŝi konsentis pri tio. Ni informos vin poste pri la rezultoj de tiu sperto.


Sro Vigne prelegis trifoje en loka radio-elsendejo (Radio Grille Ouverte 88.2). La triptiko konsistis el :Penso pri iu tutmonda lingvo de la deksepa jarcento ĝis 1887-Zamenhof: lia vivo, lia laboro, lia verko ĝis 1917 - La nuna movado. Li partoprenos en la UK de Valencià.

NIMES

En la "Domo de Eŭropo" daŭre funkcias kursoj de E° (2 gelernantoj en la unua jaro, 10 en la dua kaj tria jaroj). Pro sanproblemoj S-ino Gaussen ne povis regule instrui. S-ino Soulier, F-ino Coulomb kaj Sro Perreau sin proponis por anstataŭi ŝin; multajn dankojn al ili, tiel ne perdiĝis la entrepreno.

66 PERPIGNAN

Por la novjaraj festoj, Sroj Llech-Walter kaj Gérard iris al Tenerife (Kanariaj Insuloj), kie ili estis akceptitaj de la grupo de La Laguna. Sur la foto: starante: Sro F.-J. Davila Dorta, Sro L. Trujillo (UEA-delegito) kaj Sro G. Vogemann (Germanio); sidante: Sro J. Palermo Perez, Sro R. Llech-Walter kaj Sro C. Gérard-Voinçon.



Belegaj pejzaĝoj atendis niajn samideanojn, ankaŭ varma vetero en tiu jarfino. Ili vizitis la plej gravan kaj la plej grandan el la sep insuloj: Tenerife.

Iom pri la Kanariaj insuloj:

Navigantaj sur fantazia fabelmaro, freŝaere ventumitaj, ĉiellazure plafonitaj kaj enhavantaj grandiozan, mirravan vegetaĵon; tiuj insuloj, kronataj de altegaj montopintoj, valoj, estis jam de antikvaj tempoj, prestiĝe nimbataj de poetoj, historiistoj kaj marveturantoj.

Nuntempe iliaj loĝantoj ne estas tiel feliĉaj kiel dum la pratempa mitepoko. En la nuna erao, la

insuloj jam ne plu estas ĉe la misteralloga mondfino. Sed ĉar iliaj prestiĝo kaj nimbo estas ankoraŭ retorika figuro, jen, je ĝentila invito de Samideano Engloim, kvar bildoj pri la Kanaria Arkipelago:

Lando: La arkipelago konsistas el sep insuloj kaj sep neloĝataj insuletoj. Nomoj kaj ordo de la insuloj laŭ graveco estas: Tenerife, Gran Canaria, La Palma, Lanzarote, La Gomera, Fuerteventura, El Hierro. Loĝas tie pli ol 1 500 000 homoj. La Arkipelago en la zono de mildaj ventoj kaj varmetaj marfluoj konas nek krudan vintron nek rigoran someron.

Ĉe la marbordo nur tre malofte oni registras temperaturojn sub la grado 10 aŭ super 28 de la termometro centgrada.

La klimato faciligas kreskadon de multaj vegetaĵaj specoj sur antikva mitlando. Sed, paralele, originaj vegetaĵoj fariĝas mondfamaj. Inter tiuj elstaras unualoke tre uzita likeno, la "Lichen Roccella tinctoria". Ĝi kreskas sur krutegaj montoj, inter rokfendaĵoj, sur la bordoj de altaj ravinoj. El ĝi oni eltiris tre riĉan tinkturon. Pro tiu vegetaĵo la Arkipelago nomiĝis "Purpuraj Insuloj" jam dum la antikvaj tempoj. Sed la moderna farbindustrio senvalorigis la ekspluatadon de tiu likeno.



Alia fama indigena arbo estas tiu nomata Drago. Ĝi kreskas grandioze, sed ege malrapide. La aĝo de la plej aĝaj ekzempleroj, ankoraŭ nun vivantaj, kalkuliĝas je miljaroj. El tiu arbo oni eltiris, iel simile kiel oni eltiras kaŭĉukon, elastan gumon, ore valoran en klasika farmakopeo. Nun restas nur la arboj, kiuj kreskas spontane en la insuloj. Sed ĝia "sango", kiel oni nomis la eltiritan gumon, ne plu estas uzata.

Inter la vegetaĵoj de aliaj regionoj nun vaste kulturitaj en la insularo, troviĝas la sukerkano, kiu el la arkipelago pasis al Ameriko; la vito, kies vinoj tre famigis la insulojn dum la jarcentoj 17a kaj 18a en Francio kaj Anglio; kaj fine la bananoj kaj la tomatoj, kiuj estas la ĉefaj nunaj riĉfontoj de la regiono. Ankaŭ kulturigis terpomoj, ĉiuspecaj cerealoj, tabako, ktp kaj kreskas spontane palmoj, nopaloj, pinoj, agavoj, erikoj, ktp. La insuloj estas plenaj de vulkankrateroj. Tenerife leviĝas la monto Teide ĝis 3718 metroj super la marnivelo.

La naturo estas blua oceano kaj blua ĉielo. La naturo estas belega, grandioza. Se ne estus la homo, oni povus pensi pri la Elizeo.

Niaj amikoj RLW kaj CG certe ĝuis tiun vojaĝon. Domaĝe, ke fotokopioj ne povas montri la riĉajn kolorojn de la pejzaĝoj. Eble iam ili montros al ni bildojn pri la Kanariaj Insuloj.

RODEZ-LA CANOURGUE (12/48)

La 9an de Aprilo, en Firmi (12), je la iniciato de G. Madrières, loka esperantisto, kunveno estis organizita por prezenti esperanton. Ĉeestis dudeko da personoj (plejparte membroj de la turismo-oficejo, geinstruistoj...). Laŭvice parolis B. Legeay, J. Hénin, A. Rocher kaj respondis demandojn. Amika etoso. Espereble la grupo de Rodez rikoltos kelkajn fruktojn...

Bernard Legeay, kiu estas ankaŭ talenta desegnistoj (vidu ĉi-dekstre), estis intervjuita de la loka gazeto "L'Eveil" dufoje. Ĉar ni bezonus du paĝojn de nia magra bulteno por ĉion montri - la prezento de E° estas bonega - ni nur eltiris la paragrafon pri la klubo de E° en Rodez.



DUM LA FRANCA PREZIDENTO HAŜTRIKTE TRIKAS.....

Ni ĝojas, ke baldaŭ vizitos nin eminentaj

esperantistoj: unue Sro Tyblewski, konata en nia federacio, post lia vizito al la nacia kongreso de Pau kaj Sro P. Janton, kiu haltos ĉe ni survoje al nia federacia kongreso.

Naskiĝis la n° 2 de "la verda ŝafo", dupaĝa bulteneto de la grupo, aŭ pli precize duonpaĝa. Jen parto de ĝi:

TIPA FARMDOMO DE SUDA PARTDEPARTEMENTO AVEYRON

En nia departemento, estas tri grandaj partoj: «Causse - Ségala - Rougier».

En la «Causse» (Kos) estas malmulta tero. Akvo flugas rapide subteren. Ĝi provokas kavernojn aŭ subterenajn riverojn, «la Sorgues» inter alie. Multaj ŝafoj manĝas mallongan herbon. Per ŝafolakto, oni fabrikas fromaĝon «Roquefort» (Rokfor).

Domoj estas konstruitaj el ŝtonoj. Tri partoj konsistigas tiujn domojn. La unua parto estas teretaĝa volboforma stalo rezervata al ŝafoj kaj kelo. Per ŝtuparo, oni eniras en la duan parton, la domon mem. En mezgranda kiurejo troviĝas telerarŝranko kaj longa tablo kun bankoj por sidantoj. En la fundo de la kiurejo estas kameno. Proksime estas dormoĉambro. Fine, la tria parto, subtegmento. Fortaj traboj subportas tegmenton konstruitan per dikaj ardezoj. Apud domo estas cisterno, ĉar estas malmultaj fontoj en tiu regiono.

Homoj estas afablaj kaj ŝatas kontakton. Dum somero, multaj vizitantoj eniras en tiu bela regiono. Fiŝkaptadi en la riveroj (Sorgues, Dourdou, Tarn, Dourbie, Cernon, k.t.p.). Amaso da rokejoj nomataj «Montpellier le Vieux», kiu similas ruinaĵojn, estas loko vizitata de multnombraj turistoj. En la herbejo estas akvujo por ŝafoj, nomata «lavogne».

Tia estas pejzaĝo el nia suda partdepartemento. Ni estas kontentegaj vivi en tiu bela regiono.

← Pour plus de renseignements :
Rodez Esperanto Klubo, MJC
rue St Cyrice, 12000 RODEZ,
tél. : 65 67 01 13, ou Bernard
Legeay au 65 67 10 72

Gilbert.

A Rodez, à la MJC

En 91-92, un club d'espéranto a été créé à la MJC. Actuellement une vingtaine de personnes sont inscrites et viennent s'initier et apprendre la langue. Les personnes qui participent aux réunions hebdomadaires ont des origines diverses, un intérêt et une pratique différente, souligne Bernard Legeay : certaines y ont un intérêt purement ludique, pour jouer avec les mots, pour la traduction, d'autres s'y intéressent par rapport aux voyages, pour échanger et se servir des réseaux qui existent, d'autres encore sont attirés par le côté humaniste, idéaliste. A raison d'une heure et demi par semaine, le mardi soir, au bout d'un an vous en saurez assez pour pouvoir correspondre, parler et comprendre. Des méthodes par correspondance peuvent compléter l'apprentissage, ainsi que l'abonnement à des revues, l'écoute de cassettes

... Le club a mis en place une bibliothèque et correspond avec 8 autres clubs (Chine, Mongolie, Bulgarie, Roumanie...). Par l'intermédiaire du Club, des conférenciers étrangers sont venus à Rodez.

P.93/15

A R J E J O - H U N G A R I O

La SUNKOMPANIO nin plezure informas, ke ĝi akceptos 9 gelnantojn de la hungara lernejo "TALENTO" dum la tri lastaj semajnoj de junio.

La celo de tiu lernejo estas instigi la "talentojn" de la infanoj per la lernado de la esperanta, sekve franca lingvoj kaj de matematikoj per sorobano (japana kalkulilo). Ili deziras plibonigi siajn konojn de la lingvo, kulturo kaj eboso en Francio.

La infanoj estos gastigataj po du en diversaj familioj, kaj ankaŭ vizitos kamparajn kaj urbajn lernejojn.

Okaze de tiu simpatia evento oni intencas kunigi la guesperantistojn de la regiono dum juna semajnfino (26/27-ajn) apud Saint-Girons. La hungaraj infanoj prezentos la eblecojn de siaj scioj kaj teatraĵetojn en dimanĉa spektaklo.

Ni ja esperas viziton de multaj Arjeĵanoj por plifortigi la "revon" de niaj junaj hungaraj geamikoj.

Pliaj informoj ĉe: LA SUNKOMPANIO

09 800 ARROUT

Tel 61 96 82 08



Langue et culture espéranto

La première langue étrangère que les enfants apprennent est l'espéranto. Quels sont justement les avantages de l'espéranto dans l'enseignement des langues?

— Un sentiment de réussite rapide: les enfants sont motivés par les progrès qu'ils font et qu'ils ressentent jour après jour.

— L'espéranto les aide à se libérer des complexes et du sentiment d'infériorité qui se manifestent souvent lors de l'apprentissage des langues étrangères.

— Grâce à son orthographe phonétique et sa structure régulière, loin d'être un obstacle, il facilite d'un certain point de vue l'apprentissage de la lecture et de l'écriture en langue maternelle.

— Il ressemble à un jeu de logique et favorise ainsi le développement du raisonnement.

— Il constitue une excellente base pour l'apprentissage d'autres langues étrangères. (Des expériences faites en Allemagne et aux Etats-Unis ont montré que le temps consacré à l'espéranto est "récupéré" lors de l'apprentissage de la langue étrangère suivante.)

— Il fournit aux enfants hongrois les bases linguistiques latines indispensables à l'acquisition de la culture européenne.

— Il rend possible la communication internationale même pour les jeunes enfants.

— Il élargit l'horizon, fait connaître aux enfants la culture des pays les plus divers en induisant le respect des différents peuples et nationalités.

— Les professeurs peuvent être formés relativement vite et à peu de frais.



Fondation Talento

Budaörs, Pf. 102


H-2041, Hongrie

Téléphone: (361) 173-3454,

173-3008, 186-9699, 142-0450

Télécopie: (361) 173-3454,

140-6097, 186-9699



TOULOUSE

Malfeliĉe atingis tro malfrue SFS la anonco pri "la printempo de la lingvoj". Kunorganizis ĝin la Tuluza E°-kulturcentro 1, Rue Jean Aillet 31000 Toulouse (61819565/61255577).

Partoprenis ankaŭ eminentaj esperantistoj: Claude Piron, Martin Haase...

La debatoj estis registritaj kaj la E°-kulturcentro vendos baldaŭ kasedojn pri tiu grava evento.

PRIMA de las LENGAS

du 20 mars au 3 avril 1993

«La lingvoj en pluralo» - de Jacmé GAUDAS:

La *Prima de las lengas* celas pluralecon. En lingvo enkorpiĝas la specifa naturo de popolo. Kiel skribis Antonin PERBOSC: «Ĉiu popolo, kaj ĉiu frakcio de popolo, kiu parolas alian gepatran lingvon ol la reganta popolo, rajtas depostuli laŭ vidpunkto de la intereso de la civilizo kaj de siaj homaj rajtoj.»

Organizata de kuniĝo de asocioj, kune kun esperantistoj, la *Prima* celas esti festo de la lingvoj - la minoritataj kaj dialektiĝintaj lingvoj de Francio kaj de Eŭropo: okcitanaj, eŭska, kataluna, korsika, bretona, alzaca, nordfranca, ktp., sed ankaŭ la lingvoj de aliloke kiujn ni malbone konas sed kiuj paroliĝas tute apude: berbera, armena, asiria, esperanto...)

Tuta okazaro: renkontiĝoj, ekspozicioj, laborgrupoj, konferencoj, kaj debatoj okazos diversloke en Tuluzo kaj ĝia regiono, kaj la 3an de aprilo okazos la ĉefa kuniĝo ĉe *Palais des Sports*. Kreinte la *Prima de las lengas*, la *Institut d'Estudis Occitans* lokas sin centren de kultura vojkruciĝo - Tuluzo havas taskon ankaŭ lumigi la mondon.

- **Claude PIRON** : Linguiste Espérantiste, ex-traducteur à l'ONU et à l'OMS pour l'Anglais, l'Espagnol, le Chinois et le Russe. Professeur à l'Université de GENEVE (SUISSE).

- **Martin HAASE** : Linguiste spécialisé dans les langues minorisées. Professeur à l'Université d'OSNABRÜCK (ALLEMAGNE).

ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO



KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO

invitas
vin
al:

telefakso-34-3-7274208
Apartat, 290 - Poŝtkesto, 290
T.(9)3-716 36 33 - 08200 SABADELL
CATALUNYA - KATALUNIO

En 93 ankaŭ okazos ne-KEA aranĝoj en Katalunio:
21-24 VII: Antaŭkongreso (ĉefe turisma) en Barcelono. Respondecas la Barcelona E° Centro Carreras i Candi., 34-36-08028 Barcelono
9-16 X: Hispana E°-fervoĵista Asocio organizas renkontiĝon en Sant Cugat del Vallès.

Pri la kongreso en Majoroko (Alcúdia) KEA organizos karavanon. Tiel la vojaĝo estos konsiderinde malpli kosta. KEJ (Kataluna E°-junularo) ankaŭ invitas al kelkaj aranĝoj. Fine, se vi komprenas la hispanan, jen anonco pri nova informlibro.

Informlibro en la hispana

Inter la materialoj disdonitaj dum la KEJ-seminario estis en-havtabelo de aperonta verko de Antonio Valén pri esperanto.

Temas pri novstila informilo pri esperanto, multe pli interesa ol la tradiciaj libroj de Janton aŭ Auld. Finfine aŭtoro riskas diskuti la demandojn, kiun normala homo faras al si pri esperanto: Ĉu esperanto estas facila? Kiom longe oni bezonas por lerni ĝin? Kiom da homoj ĝin parolas? Kial homoj lernas esperanton? k.s. La aŭtoro ne nur respondas al tiuj demandoj, sed li sukcesas tion fari kredeble kaj aŭtoritate per citado de abunda bibliografio. Aparte interesa, krom la perfektaj ĉapitroj pri lingvo kaj literaturo, estas la komentariita bibliografio, kie la aŭtoro analizas la eldonitajn lernolibrojn kaj vortarojn, kaj rekomendas la plej elstarajn verkojn en esperanto.

La libro estas dividita en 16 ĉapitroj kaj 6 aneksoj. La iom longaj ĉapitroj estas subdividitaj, tiel ke ĝenerale unuo longas malpli ol du paĝojn. La 100 paĝoj de la libro, interese ga pro sia enhavo, tial fakte legigas unuspire. Ĉiu ĉapitro krome enhavas resumon de la fino por firmigi la konceptojn aŭ por rapidemaj interesigantoj.

La aŭtoro, 27-jarulo el Soria, ido de Franja-ano kaj mem katalunparolanto, estas filologo pri la hispana. Lia libro *Información detalla sobre el esperanto* eble eldoniĝos antaŭ la UK en Valencio. Momente li tradukas *Lingvistikajn aspektojn de esperanto* de John Wells.

haf

KEA-kongresoj '93

Barcelono, 18-21 Julio

12-a Internacia Literatura Forumo
(La literatura kritiko en esperanto:
Inter estetika universalo kaj poetika relativo)

Alcúdia (Majoroko), 9-12 oktobro

26-a Kataluna Kongreso de Esperanto

KEJ-aranĝoj '93
6-7 februaro: Asembleo
17-18 aprilo: Preparo de Vraca IJK
24-27 junio: Kaverne en Murcio
30 oktobro-1 novembro: Internacia KEJ-seminario pri sekso en esperanto

ĈU VI BEDAŬROS
ALĜU TUJ

Version informatique NOUVEAU COURS D'ESPERANTO

Edmond Ludwig - Renée Triolle
Prix : 120 F (version 5"1/4 ou 3"1/2)


Avec dictionnaires français-espéranto (8500 entrées) et espéranto-français (6400 entrées) de Christian Bertin

Pour la première fois dans le monde espérantiste, un cours complet d'espéranto est disponible aussi sur ordinateur. Ce cours pour ordinateur fonctionne seulement avec des ordinateurs compatibles IBM PC avec carte graphique EGA ou VGA (vous verriez d'autres caractères que les lettres accentuées de l'espéranto si vous ne disposiez pas de l'une de ces cartes).

Vous pouvez faire apparaître sur l'écran par la frappe de deux touches ou par un clic de souris soit le cours soit la préface soit les corrigés d'exercices soit la grammaire soit l'anthologie soit le dictionnaire espéranto-français soit le dictionnaire français-espéranto selon votre choix comme si tous ces livres étaient ouverts sur votre table. De plus par la commande de recherche vous pouvez faire apparaître immédiatement sur l'écran le texte qui contient le mot ou l'expression à laquelle vous voulez accéder.

Les lettres accentuées de l'espéranto minuscules et majuscules ont leur aspect normal sur l'écran et pour chercher un mot espéranto avec lettres accentuées, il vous suffit de taper l'accent circonflexe avant les lettres c, g, h, j, s ou un tréma avant la lettre u comme on le fait pour les mots français tels que "même", "grâce", "boîte" ou "Noël".

Seule l'image d'automobile (page 162) est absente de ce cours électronique. La grammaire simple du cours a été remplacée par une plus complète. De plus, vous disposez de deux dictionnaires qui contiennent toutes les racines du cours à l'exception des articles techniques "Kemio kaj biokemio de sukero", "aŭtomobilo" et "sekureco en aŭtomatigitaj oficejoj" et de deux mots introuvables dans le PIV : "griti" (p.138) et "maĝo" (p.183).



Rappel :

- Cours d'espéranto en français pour compatible PC avec carte graphique EGA ou VGA (12 leçons sur les affixes), de C. BERTIN, 60 F. Une disquette, format 5"1/4 ou 3"1/2.
Les deux cours : 150 F.

- Computer Dictionary english-espéranto (draft), de C. BERTIN, 3800 mots ou expressions, 106 p., A5, 42 F.

- Angla-esperanta telekomunikita vortaro, de C. BERTIN, 1600 mots ou expressions, 76 p., A5, 29 F.

Frais d'envoi : + 20%.

Editions Christian BERTIN - 60, allée de la Renaudière, 35510 CESSON-SEVIGNE. CCP 143 19 L
Rennes.

Enspezoj:

Je la 31-12-91 ni havis	24 592,44 F
SFS	4 010 (parte por 93)
UFE	1 002,50
MJC Rodez (prelegvojaĝo)	201
Kongreso : profito	760
Sparkaso "	1 072,36
Aŭtuna kunveno en Sète	1 740
Ĉeko	822,31

34 200,61

Elspezoj:

Helpo/Nîmes=vojaĝo:	800 F
SFS	3889 F
Helpo/Junuloj de 09	200
"Que sais-je?"	5616
Prelegvojaĝo	201
Donaco (libretoj)	83
Pĉk	5
Kunveno de Sète	1760

12554 F

Do restas 34200,61F - 12554 F = 21 646,61F

Sur pĉk : 1357,37
En la ŝparkaso 20289,24F

La kasistino:L.Négron

E K Z A M E N O J :

Sukcese trapasis

Okaze de la Federacia kongreso
en Montpellier (16 V 92)

Okaze de la Internacia Semajno
en Sète (en Septembro 92)

ATESTO^o pri LERNADO

Aumeunier Rosa
Legeay Bernard

Garrigues Monique
Rozières Hélène

"" pri PRAKTIKA LERNADO

Aumeunier Rosa
Berthonneau Blaise (TB)
Legeay Bernard (TB)

Atesto^o pri KAPABLECO
(skriba parto)

Legeay Bernard
May Micheline

Pleuteri Simona

Gratulojn al ĉiuj kandidatoj !

Vous trouverez ci-joint une lettre très intéressante de la "Commission des communautés européennes" de Bruxelles, adressée à Jean Amouroux. A la suite d'une émission en Février de W.Leymergie sur France 2 (Télématin), J.A.avait proposé l'E° pour l'hymne européen. Le moins qu'on puisse dire, c'est que M.Claude Landes, du secrétariat général, ne fait pas preuve d'une grande originalité. Les arguments exposés sont archi-connus et font preuve de bien peu de sérieux.

J.H.



COMMISSION
DES COMMUNAUTÉS
EUROPEENNES

Secrétariat Général

Bruxelles, le
SG (93)D/82076/1

31-03-1993

Monsieur,

Le Président Delors m'a chargé de vous remercier d'avoir bien voulu lui adresser, par l'intermédiaire de France 2, vos suggestions quant au texte qui pourrait accompagner la musique de l'Hymne européen.

Vous suggérez de rédiger ce texte en espéranto. Nul ne doute que l'usage de l'espéranto puisse contribuer au rapprochement des peuples d'Europe et du monde. Il faut néanmoins souligner qu'une langue neutre ne pourrait posséder toute la richesse et la diversité culturelle et historique des langues naturelles. L'imposer risquerait d'entraîner une perte de tradition et d'identité pour l'Europe.

En tout état de cause, je puis vous assurer que le Président Delors a apprécié l'intérêt que vous avez ainsi manifesté pour l'idée européenne et sa concrétisation à travers l'action que mène la Communauté.

Je vous prie de croire, Monsieur, à l'assurance de ma considération distinguée.


Claude LANDES



**KULTURA ESPERANTO-DOMO
GRÉSILLON – F-49150 BAUGÉ**
telefono : 41 89 10 34

Kulturaj Arangoj 1993

- 24/04 – Internacia renkonto de infanoj
01/05 Por la infanoj kiuj jam eklernis la lingvon. Kursoj, promenadoj, distraĵoj, studo de la ĉirkaŭa naturo, inicado al metiaj laboroj, verkado de staĝ-gazeto.
- 23/06 – Internacia amika renkonto
08/07 Nedevisa programo: kursoj, gvidata konversacio, komunaj promenadoj, teatradantaŭvidita.
- 08/07 – Seminario Cseh "A"
21/07 Gvidos Eva BONDAR. Kursoj je 1-a kaj 2-a niveloj por diverslingva ĉeestantaro, gvidata konversacio, distraĵaj vesperoj.
- 22/07 – Seminario Cseh "B"
04/08 Gvidos Eva BONDAR. Kursoj je 1-a kaj 2-a niveloj, gvidata konversacio, uzado de sorobano (japana abako), paper-faldado (gvidos Kimie MARKARIAN), distraĵaj vesperoj.
- 05/08 – Lernu, praktiku, perfektigu
18/08 1-a semajno: gramatiko (gvidos Fernand BOYET). 2-a semajno: tradukado (gvidos Georges LAGRANGE). Gvidata konversacio, distraĵaj vesperoj.
- 19/08 – Por la instruantoj
01/09 Pedagogia helpo, helpiloj, kursoj, distraĵaj vesperoj.

Eblas organizi ekskursojn al la multaj regionaj vidindaĵoj laŭ la elekto de la ĉeestantoj. Libro-bindado, korb-farado kaj aliaj metiaj laboroj estas antaŭviditaj. Nia libro-servo disponigas al la ĉeestantoj la necesan materialon por studi kaj lerni. La Fonduso Belbona Espero donas limigitan nombron da subvencioj al kelkaj gejunuloj ne-francaj, kiuj tiel rajtos partopreni studperiodojn rabatpreze. Ĉiujn detalajn informojn petu de la ĉi-supra adreso.

Konfirmo de rezervado nur kontraŭ poŝtmarko aŭ respondkupono.



En "Heroldo"

LA KVINPETALO
internacia staĝejo de LF-koop

respondecas: Suzanne Bourot
administras: Societo Yvonne Martinot
pck Limoges 2408-62 H



route de Civaux
F-86410 Bouresse (Francio)
tel. +33-49-428074


PROGRAMO

- 19-24 IV : Tradukado (skriba parto de "Kapableco"): G. Lagrange
- 26 IV-1 V : Romanika arto en Piktavio
- 8-14 V : Flaŭristoj : Ru Bossong
- 15-20 V : Bonstato ĉiutage dank'al plantoj kaj movoj (Nikolin')
- 20-26 V : Piedirantoj: G. Gabillon + M. Barrault
- 10-15 VI : Omaĝo al Lorjak: Lia verko
- 9-14 VII : Preparado al 4a+5a-gradaj ekzamenoj
- 13-18 VII : Kongreso-teĥniko (C. Fighiera/Heroldo)
Samtempe: Praktikado de E^o por komencintoj
- 22-28 VII : Lingvistiko: Blazio Vaha (Hungara verkisto)
Samtempe: Praktikado de E^o por komencintoj
- 3-8 VIII : Informado kaj publikaj rilatoj : G. Silber
Kino kaj videobendo: J. Schiller (Hungara fakulino)
- 12-17 VIII : Kudro-arto : Marie Hunninck
- 19-24 VIII : Literaturo: Chris Declerck
- Okt/Nov. : Aŭtuna staĝo
- Decembro : Zamenhofa semajno dunivela (10-15 XII)

Tarifo 93: tranoktado: 200F matenmanĝo: 18F Tagmanĝo: 49F
vespermanĝo: 30F Aliĝo al ĉiu staĝo: 100F

1/1

Ne mankas okazoj praktiki la lingvon ĉi-somere. Sur la mapeto de "Heroldo", kelkaj Esperantejoj.
Al "La kvinpetalo" kaj "Grejlljono", oni povas aldoni KCE en La Chaux de Fonds, kie denove okazas staĝoj dum la tuta jaro. (Svisa Juraso).
Kompreneble kun la UK de Valencía disvolviĝos antaŭ- kaj post-kongresoj. Ni ne forgesu la arangojn de niaj grupoj en Agde, Habère-Poche k. Sète! Lastfoje ni menciis staĝon pri oleo-pentroarto apud Pamiers.
Ekumena kongreso (IKUE+KELI) okazos en Viviers de la 16a ĝis la 23a VII. (Petu detalojn de SFS).
Internacia Korusa staĝo disvolviĝos en Fontaine de Vacluse (84), de la 19a de VII ĝis la 23a matene. Instruos Dimităr Terziev, jam konata en nia reĝiono (petu aliĝilon de SFS).
Oni ne nur kantas sed ankaŭ vizitos paperfabrikon, kristalfabrikon, muzeon pri speleologio, la faman Vaŭkluzan fonton.



VALENCIO 24-31 JULIO 1993

Distra Paĝo

(12)

Karaj krucvortemuloj,
Bonvolu noti, ke pro ĝenerala peto (ĉu ne, Ivina?!)
mi plifaciligis la difinojn, plej strikte sekvante
la PIV-on... Bonan ŝancon. La aŭtoro: BB.

KRUCVORTOJ

I										
II										
III					■					
IV				■						
V			■				■			
VI		■						■		
VII										
VIII				■				■		
IX			■				■			
X										
	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10

HORIZONTALALE

- I) Kristan(o).
- II) Sen protesto kaj plendo.
- III) Donjuano aŭ Fidelio / Radike, ne mankas al la antaŭaj.
- IV) Bone havi, restigi / Funebra vaz(o).
- V) Elemento / Trinkaj(o) / Adverbo.
- VI) s : Tero kaj akvo / Ĉefa arterio.
- VII) Malpacega.
- VIII) Estinta / Pronomo.
- IX) s : Filika sporangiaro / Senmank(a) / Tremegig(i).
- X) Granda insul(o) en la Hinda Oceano.

VERTIKALE

- 1) Ekonomika doktrin(o).
- 2) Kiel rolo kutime ludata aŭ kantata.
- 3) Nazmalsano / s : Ĉefurbo.
- 4) Venigi al si / Monaĥejstra.
- 5) Freŭda mem(o) / Senorda vinbero / Du el pugo.
- 6) s : Aervibro / Kiel likvaĵo sen ripozo.
- 7) Vigla danc(o).
- 8) Sekreциanta kavet(o) / Doma krustul(o).
- 9) Rn, radike / Komenco de kalendaro.
- 10) Grad(o) de varmo.

s : sone

D-ro BERTHONNEAU

Solvej de la 143-a

I	I	N	T	E	L	I	G	E	N	T
II	N	■	U	K	■	T	I	N	T	E
III	S	A	K	R	I	S	T	I	■	S
IV	T	R	O	A	■	E	R	G	O	T
V	R	U	■	N	O	V	A	■	M	A
VI	U	L	O	■	R	O	■	A	T	M
VII	M	E	L	A	N	K	O	L	I	E
VIII	E	V	O	B	■	S	T	E	R	N
IX	N	■	K	A	N	A	R	I	■	T
X	T	E	S	T	A	M	E	N	T	O

Rachel Berthonneau
ĝojas anonci al vi
la naskigon de
T H O M A S

je la 23a de II-93.

Gratulojn al la
feliĉaj gepatroj !

CHARADE A TIROIRS (R. Bœ)

Mon premier est un assassin
Mon deuxième acquitte ses dettes
Mon troisième est un bon portraitiste
Mon quatrième est un virulent contradicteur
Mon tout, plus que centenaire, se porte très bien

POR RIDETI

El "la verda ŝafo"

- Iam, mi restis tridek kvin tagojn sen manĝi !
 - Kiel vi povis elteni ?
 - Mi nur manĝis nokte !
- La pentristo Ĵus alvenis en vilaĝo kun sia farboskatolo en la mano kaj ŝia stablo sub la brako.
- Mi donos al vi dek frankojn se vi permesus al mi pentri vin, li diris al maljuna kamparano.
 - Mi bonvolas, respondis la maljunulo, sed ĉu vi havas tion kio necesas por min formeti la farbon, poste ?
- Ĉu estas vere paĉjo, ke dikaj fiŝoj manĝas sardinojn ?
 - Jes, mia filo.
 - Tiam, kiamaniere ili faras por malfermi la konservujojn ?

La limdato por la sendo
de viaj kontribuoj estas
la 26a de Junio 1993.


Bonvolu noti la daton!
Sendi al: J.Hénin
Rte de Montcayroux
48500 La Canourgue
Tel:66 32 86 36. Dankon!

SOLUTION DE LA CHARADE A TIROIRS

ESPERANTO


Mon tout, mais cela vous l'aviez trouvé, c'est :
Mon 4°, c'est TO, parce que TO hue Bohu
Mon 3°, c'est AN, parce que AN fait ta mine
Mon 2°, c'est PER, parce que PER pate Tuel
Mon 1°, c'est ES, parce que ES tue Aire

Internacia Semajno



ĉe Alpoj

Internacia Semajno



ĉe mediteraneo

La Kultura Centro de Montpellier proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto .

Profitu, samtempe trapasi agrablajn feriojn en la havenurbo SETE, en ripoza parko de pluraj hektaroj ĉe Mediteranea bordo, dum ideala periodo pro la bona vetero sed ekstere de la somera troahomamaso .

Ĉe ni vi ĝuos plurnivelajn kursojn kaj, ankaŭ banadon, fiŝkaptadojn, ekskursojn kaj ... bonan manĝaĵon.

-o0-o0-o0-o0-


SEJOUR LINGUISTIQUE AU BORD DE LA MER

Le Centre Culturel Esperanto de Montpellier vous propose d'apprendre ou de vous perfectionner en Esperanto.

Profitez en même temps de passer d'agréables vacances à SETE, dans un parc reposant de plusieurs hectares au bord de la Méditerranée pendant une période idéale jouissant d'un temps excellent et en dehors de l'afflux estival .

Chez nous vous pourrez suivre des cours de plusieurs niveaux mais aussi profiter de baignades, pêche, excursions, et..... bonne nourriture .

-o0-o0-o0-o0-



SEJOUR LINGUISTIQUE DANS LES ALPES

Le Centre Culturel Esperanto de Montpellier vous propose d'apprendre l'Esperanto ou de perfectionner vos connaissances

Profitez en même temps de passer d'agréables vacances dans un lieu reposant de montagne, dans le cadre d'une agréable maison familiale, près de la Suisse (30km au sud-est de Genève).

Vous trouverez plusieurs niveaux de cours d'Esperanto et aussi marches à pied dans la montagne, excursions, belles soirées et ... bonne table .

-:~::~~::~~::~~::~~::~~::~~::~~::~~::~~::~~::~~::~~::~~::~~::~-

La Kultura Centro de Montpellier proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri esperanto .

Profitu, samtempe trapasi agrablajn feriojn en montara ripoza loko ; kadre de agrabla familia domo, proksime de Svislando (30 km sud-oriente de Ĝenevo) .

Vi trovos plurajn nivelojn de E-aj kursoj kaj ankaŭ piediradon en la montaro, ekskursojn, belajn vesperkunvenojn kaj ... bonan manĝaĵon ...

19° SEMAINE INTERNATIONALE DU 04 AU 11 09 1993

"LE LAZARET " SETE

Adresse pendant Maison Familiale "Le Lazaret"
la semaine La Corniche
34200 SETE
Tel: 67.53.22.47

PROGRAMME

Matinée: cours de plusieurs niveaux
Après midi: excursions, cours ou temps libre
Soirée: programme culturel ou divertissements

EXCURSIONS: nombreuses possibilités

ADHESION: 240 FF avant le 1° juin

300 FF après cette date

gratuit pour les jeunes de moins de 26 ans.

LOGEMENT: on peut loger à la Maison Familiale

dont le prix est le suivant:

1 personne dans une chambre d'une personne la semaine:1554 FF

1 personne dans une chambre de 2 personnes la semaine:1407 FF

Les prix comprennent la chambre et les 3 repas.

Possibilité de camping.

La maison convient aux personnes en fauteuils roulants .

Réservation du logement: valable après paiement d'une avance de 300 FF .

Date limite d'inscription: 15.7.1993.

Renseignements, réservations, informations

ESPERANTO

5 rue du Docteur Roux

F 34000 MONTPELLIER

FRANCE

Veillez joindre une enveloppe avec votre adresse .

18° SEMAINE INTERNATIONALE DU 21 AU 28 AOUT 1993

"LA JOIE DE VIVRE" HABERE POCHE

Adresse pendant "JOIE DE VIVRE"
le séjour HABERE POCHE
74420 BOEGE
TEL:50.39.52.44

PROGRAMME

Matinée: cours de plusieurs niveaux
Après midi: excursions, cours ou temps libre
Soirée: programme culturel ou divertissements

EXCURSIONS: nombreuses possibilités

ADHESION: 240 FF avant le 1° juin

300 FF après cette date

gratuit pour les jeunes de moins de 26 ans.

LOGEMENT: on peut loger à la Maison Familiale

dont le prix est le suivant:

1 personne dans une chambre d'une personne la semaine:1344 FF

1 personne dans une chambre de 2 personnes la semaine:1078 FF

Les prix comprennent la chambre et les 3 repas.

Possibilité de camping

La maison convient aux personnes en fauteuils roulants .

Réservation du logement: valable après paiement d'une avance de 300 FF .

Date limite d'inscription: 1.7.1993.

Renseignements, réservation, informations

ESPERANTO

5 rue du Docteur Roux

F 34000 MONTPELLIER

FRANCE

Veillez joindre une enveloppe avec votre adresse .

18° INTERMACIA SEMAJNO 1993 08.21 ĝis 28

"LA JOIE DE VIVRE" HABERE- POCHE

Adreso: dum " Joie de Vivre"
la semajno HABERE POCHE
74420 BOEGE
FRANCIO
Tel: 50.39.52.44

PROGRAMO

Matene : diversnivelaj kursoj
Posttagmeze: Ekskursoj, kursoj aŭ libera tempo
Vespere: Amuzaj kaj kulturaj programoj

EKSKURSOJ- Eblaj sur loko.

ALIG- KOTIZO: 240 FF antaŭ la 1a de Junio
300 FF poste

senpaga por junuloj malpli ol 26 jaroj

LOGADO: Oni povas loĝi en la feriejo laŭ la prezoj

1 persono en unupersona ĉambro semajne: 1344 FF

1 persono en dupersona ĉambro semajne : 1078 FF

La prezoj entenas la loĝadon kaj la tri manĝojn.

La domo taŭgas al rulseguloj .

Mendo de loĝado valoras nur post pago de antaŭmendo
de 300 FF

Limtado de antaŭmendo de ĉambro: 1993.VII.1

Oni povas tendumi.

Aliĝoj, informoj, klarigoj:

ESPERANTO

5 rue du Docteur Roux

F 34000 MONTPELLIER

FRANCIO

- bonvolu aldoni koverton kun via adreso.

19° INTERMACIA SEMAJNO 1993 09.04 ĝis 11

"LE LAZARET " SETE

Adreso: dum Maison Familiale "Le Lazaret"
la semajno La Corniche
34200 SETE
FRANCIO
Tel: 67.53.22.47

PROGRAMO

Matene : diversnivelaj kursoj
Posttagmeze: Ekskursoj, kursoj aŭ libera tempo
Vespere: Amuzaj kaj kulturaj programoj

EKSKURSOJ- Eblaj sur loko.

ALIG- KOTIZO: 240 FF antaŭ la 1a de Junio
300 FF poste

senpaga por junuloj malpli ol 26 jaroj

LOGADO: Oni povas loĝi en la feriejo laŭ la prezoj

1 persono en unupersona ĉambro semajne: 1554 FF

1 persono en dupersona ĉambro semajne : 1407 FF

La prezoj entenas la loĝadon kaj la tri manĝojn.

La domo taŭgas al rulseguloj .

Mendo de loĝado valoras nur post pago de antaŭmendo
de 300 FF

Limtado de antaŭmendo de ĉambro: 1993.VII.15

Oni povas tendumi.

Aliĝoj, informoj, klarigoj:

ESPERANTO

5 rue du Docteur Roux

F 34000 MONTPELLIER

FRANCIO

- Bonvolu aldoni koverton kun via adreso.

INTERNACIA SEMAJNO - SETE
ALIGILO (Bulletin d' adhesion)

Familia Nomo
(Nom)
Persona Nomo
(Nom)
Adreso
(Adresse)

.....Tel Num
(N° de tel)

- Mi loĝos en la familia domo " Le Lazaret"

• (je logerai à la Maison "Le Lazaret"

- Mi antaŭmendos unu liton (je réserve un lit)

en unupersona ĉambro (dans une chambre pour une personne)

en dupersona ĉambro (dans une chambre pour deux personnes)

forstreku la neutilan linion
(rayer la mention inutile)

B.T.
T.S.V.P

INTERNACIA SEMAJNO - HABERE POĤHE
ALIGILO (Bulletin d' adhesion)

Familia Nomo
(Nom)
Persona Nomo
(Nom)
Adreso
(Adresse)

.....Tel Num
(N° de tel)

- Mi loĝos en la familia domo " La joie de vivre"

(je logerai à la Maison "La joie de vivre"

- Mi antaŭmendos unu liton (je réserve un lit)

en unupersona ĉambro (dans une chambre pour une personne)

en dupersona ĉambro (dans une chambre pour deux personnes)

forstreku la neutilan linion
(rayer la mention inutile)

B.T.
T.S.V.P.

-Mi ne loĝos en la familia domo " La Joie de Vivre" sed mi manĝos regule (Je ne logerai pas à la Maison "La Joie de Vivre" mais j' y mangerai régulièrement)

ESPERANTO
5 rue du Docteur Roux
F 34000 MONTPELLIER
FRANCIO

C.C.P. N° 2361.61.T
MONTPELLIER
CENTRE CULTUREL ESPERANTO
Semaine Internationale

(I) Poŝta ĝirkonto en Francio

Bonvolu aldoni koverton kun via adreso
Veuillez joindre une enveloppe avec
votre adresse.

-Mi ne loĝos en la familia domo " Le Lazaret "
" sed mi manĝos regule (Je ne logerai pas
à la Maison "Le Lazaret " mais j' y
mangerai régulièrement)

ESPERANTO
5 rue du Docteur Roux
F 34000 MONTPELLIER
FRANCIO

C.C.P. N° 2361.61.T
MONTPELLIER
CENTRE CULTUREL ESPERANTO
Semaine Internationale

(I) Poŝta ĝirkonto en Francio

Bonvolu aldoni koverton kun via adreso
(Veuillez joindre une enveloppe avec)
votre adresse.